

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2018:1

Zamenhofa tago en Norrbotten

Bildoj el la Facebook-grupo Norrbottens Esperantosällskap



Gabriel Erixon kaj Lotta Lauritz

Zamenhofa Tago en Luleå 2017

“Ora Ĵurnalo”
– organ för Ora Klubo –
nr 3 ute nu!

Den är gratis. Ladda ner från:
www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_jurnalo_n-ro_3.pdf
(Tidigare nummer finns tillgängliga på: www.esperanto-gbg.org)

“Ora Ĵurnalo”
– ilo por Ora Klubo –
numero 3 nun akirebla!

Senkosta. Elŝutu el:
www.esperanto-gbg.org/oraklubo/Ora_jurnalo_n-ro_3.pdf
(Pli fruaj numeroj akireblaj el nia retpaĝo: www.esperanto-gbg.org)

★ **Ora Ĵurnalo**

Numero 3, januaro 2018

*Al la tuta mondo:
Bonvenon al la verda Gotenburgo!*



La germana preĝejo en Gotenburgo

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:
www.esperanto-gbg.org*

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2018 • 106-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen: laespero@esperantoforbundet.se**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson**Tryck:** Pingvinpress, Råå**Prenumeration:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm**E-post:** svenska@esperantoforbundet.se**Nätsida:** www.esperantoforbundet.se**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123**Medlemsavgift:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: c/o Nordenstorm

S:t Olofsgatan 26; 753 32 Uppsala

Postgiro: 578-5**Nätsida:** www.esperanto-gbg.org/eldona/**E-post:** eldona@esperantosverige.se

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,**Nätsida:** www.esperantogarden.se**E-post:** info@esperantogarden.se**Telefon:** 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperantoforbundet.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Styrelsen –

inte för vem som helst, men inte heller omöjligt!

Att vara med i styrelsen innebär en del arbete, och i slutändan en del ansvar. Att försöka arbeta för föreningens bästa, för medlemmarna, och att med eftertanke, diskussion och gemensamma beslut försöka använda föreningens pengar klokt. Pengar som vi främst får in i form av medlemsavgifter, gåvor, och i vissa fall försäljning av böcker.

Att vara med i styrelsen är kanske inte för vem som helst, men behöver inte heller vara så svårt eller betungande eller skrämmande som många verkar tro. Det finns rutiner för mycket av styrelsearbetet och när val till styrelsen görs i samband med årsmötet så är det normalt bara halva styrelsen som byts ut (eller väljs om). Som nyvald behöver man inte oroa sig för att få allt ansvar. Det är förstås bra att ha erfarenheter av föreningsarbete, till exempel från den egna klubben, men man behöver inte kunna precis allt från början. Snarare är det bra att komma in med nya ögon och kanske lite andra erfarenheter och ifrågasätta varför den nuvarande styrelsen gör så eller så. Föreslå hur saker skulle kunna göras annorlunda eller hur något kan bli enklare eller tydligare att förstå.

Mycket av arbetet sköts över internet

I nuläget och sedan ett par år tillbaka försöker vi i styrelsen sköta så mycket som möjligt via internet, eftersom vi är utspridda i landet. Styrelsemöten håller vi ofta i Skype, ett gratisprogram för röst- eller videosamtal över internet, och aktuella frågor diskuteras däremellan i vårt diskussionsforum Diskutejo på hemsidan intere.se/arkivo, där alla medlemmar som vill också kan få insyn i styrelsearbetet och komma med synpunkter eller förslag. Ibland faller vi tillbaka på diskussioner via e-post, men när det händer, försöker vi styra in diskussionen i Diskutejo, eller åtminstone kopiera in den där i efterhand, så att vad som sagts och tryckts bevaras, och i förekommande fall också blir synligt att ta del av för alla medlemmar.

Ganska blygsamma tekniska förutsättningar

För att kunna delta aktivt i styrelsen är det önskvärt att man har tillgång till en dator – eller surfplatta eller motsvarande – med webbläsare, e-post och möjlighet att köra Skype. Det är också nödvändigt att ha åtminstone grundläggande kunskaper i att använda dessa verktyg, så klart, men detaljer och specifika funktioner går att lära sig med tiden. Är ens uppkoppling för långsam eller datorn för gammal för att köra Skype, går det faktiskt också att delta i Skypesamtal med en vanlig mobiltelefon, även om det då innebär en viss minutkostnad som för de flesta vanliga telefonsamtal. Några gånger per år har vi även "vanliga" möten, då vi träffas på samma plats under en dag eller två.

Vill du vara med i SEF:s styrelse och hjälpa till med arbetet med att stötta och utveckla esperantorörelsen i Sverige, eller känner du någon som kunde tänka sig det, kontakta valberedningen via e-postadressen valberedningen@esperantoforbundet.se eller vänd dig till valberedningens ordförande Siv Burell, tel 070 721 34 79.

En la du antaŭaj numeroj de La Espero vi povis legi pri "Sveda Kongreso 2018". En Interreto ni kutime uzas la mallongigon SvespKon (Sveda Esperanto-Kongreso). Ĉi-jare ni nomas ĝin SkespKon, ĉar ĝi estas *Skandinava Esperanto-Kongreso*. La tri landaj organizoj DEA, NEL kaj SEF kune celebras la fakton ke antaŭ 100 jaroj okazis la unua skandinava esperantokongreso.

Detalan programon kun aliĝilo, tempindikoj, kostoj, ekskursoj, vojpriskriboj al la terminaloj, eĉ fotoj de la ejoj surŝipe, vi trovos en la retejo esperantonordio.org. Se vi ne havas aliron al Interreto, telefonu al Ann-Louise (073 617 01 23) kaj petu la informojn surpapere.

Bedaŭrinde ni devis ŝanĝi la prezon de la kongresvojaĝo al SEK 2.600/persono en dividita kabino kaj SEK 3.600 en kabino por propra uzo. La kaŭzo estas ke la ŝipkompanio ne tenis sian promeson pri la prezoj en svedaj kronoj, kiujn ni ricevis en junio 2017. Ili ŝuldas tion al ŝanĝoj en la kurzoj de valutoj.

Gravaj punktoj por ni svedoj:

- Aliĝu pere de la formularo en esperantonordio.org aŭ telefonu al Ingrid 072 847 22 46 antaŭ la 31-a de marto.
- Pagu al SEF:s Specialkonto 14 74 29-5 antaŭ 31/3.
- Enŝipiĝo en la DFDS terminalo en Kopenhago ĵaŭde la 10-an de majo inter 13.00 kaj 13.45, aŭ

- Enŝipiĝo en la DFDS terminalo en Oslo vendrede la 11-an de majo inter 13.00 kaj 13.45.
- Ne forgesu kunporti pasporton aŭ alian oficiale rekonitan identigilon (kun foto). La ŝipkompanio postulas tion.
- La jubilea programo okazos en la konferencejo de la ŝipo vendrede la 11-an de majo inter 14.00 kaj 16.30.
- La jarkunveno de SEF okazos vendrede la 11-an de majo inter 16.30 kaj 19.30, ankaŭ en la konferencejo de la ŝipo.
- Tiuj kiuj enŝipiĝis en Kopenhago forlasos la ŝipon en Kopenhago sabate la 12-an de majo post la 9.45-a horo.
- Tiuj kiuj enŝipiĝis en Oslo forlasos la ŝipon en Oslo dimanĉe la 13-an de majo post la 9.45-a horo.
- Tiu kiu volas partopreni ekskurson en Kopenhago devos indiki tion en la aliĝformularo kaj kunporti danajn kronojn por pagi la kostojn surloke. (Ev boatvojaĝo kaj manĝo.)
- Kunportu monon por trinkaĵoj surŝipe. 1 biero aŭ 1 glaso da vino por la manĝo kostas DKK 50, botelo da vino DKK 230.
- Se vi volas legi pri la ŝipo, vizitu la retpaĝon www.dfsseaways.se.
- Junaj membroj de SEF kiuj volas peti vojaĝsubvenciojn konsultu <http://esperantoforbundet.se/index.php/verksamheten/stodja-medlemmar>.

Aliĝu !!

al la kongresa vojaĝo pere de formularo en la Kalendaro de SEF (esperantoforbundet.se) antaŭ la 31-a de marto 2018. Se vi ne havas retaliron aŭ ne kapablas mem plenigi la formularon, telefonu al Ingrid 072 847 22 46 por peti helpon.

SkespKon i stället för SvespKon

De två föregående numren av La Espero kunde vi läsa om "Sveda Kongreso 2018". På Internet använder vi vanligen förkortningen SvespKon (Svenska Esperanto-Kongressen). I år kallar vi den för SkespKon för den är Skandinavisk Esperantokongress. De tre landsförbunden DEA, NEL och SEF firar tillsammans det faktum att för 100 år sedan arrangerades den första skandinaviska esperantokongressen.

Ett detaljerat program med anmälningsblankett, tidsplan, utflykter, vägbeskrivningar till terminalerna, t o m foton av lokalerna ombord, hittar ni på internetsidan esperantonordio.org. Om ni inte har tillgång till internet, ring till Ann-Louise (073 617 01 23) och be om informationen på papper.

Tyvärr blev vi tvungna att ändra priset på kongresskryssningen till 2.600 kr per person i delad hytt och 3.600 kr i hytt för eget bruk. Orsaken är att rederiet inte hållit sitt löfte om priset i svenska kronor som vi fick i juni 2017. De hänvisar till förändringar i valutakurserna.

Viktiga punkter för oss svenskar:

- Anmäl dig via formuläret i esperantonordio.org eller ring till Ingrid 072 847 22 46 före 31/3.
- Betala till SEF:s Specialkonto 14 74 29-5 före den 31/3.
- Incheckning i DFDS terminal i Köpenhamn torsdag den 10 maj mellan 13.00 och 13.45.

- Incheckning i DFDS terminal i Oslo fredag den 11 maj mellan 13.00 och 13.45.
- Glöm inte ta med pass eller annan officiellt erkänd id-handling (med foto). Rederiet kräver detta.
- Jubileumsprogrammet äger rum i fartygets konferensavdelning fredag den 11 maj kl 14.00 – 16.30.
- SEF:s årsmöte äger rum fredagen den 11 maj mellan 16.30 och 19.30, också i fartygets konferensavdelning.
- De som steg på i Köpenhamn lämnar fartyget i Köpenhamn lördag den 12 maj efter kl 9.45.
- De som steg på i Oslo lämnar fartyget i Oslo söndag den 13 maj efter kl 9.45.
- Den som vill delta i en av utflykterna i Köpenhamn måste ange detta i anmälningsformuläret och medföra danska kronor för att betala kostnaderna på plats. (Ev båtutur och mat.)
- Ta med pengar till dryck ombord. 1 öl eller 1 glas vin till maten kostar DKK 50, en flaska vin DKK 230.
- Om du vill läsa om fartyget, besök hemsidan www.dfsseaways.se.
- Unga medlemmar i SEF som vill ansöka om resebidrag kan läsa om detta på <http://esperantoforbundet.se/index.php/verksamheten/stodja-medlemmar>.

Anmäl dig !!

till kongressan med hjälp av formuläret i SEF:s Kalendaro (esperantoforbundet.se) före den 31 mars 2018. Om du inte har tillgång till Internet eller inte själv klarar att fylla i formuläret, ring till Ingrid 072 847 22 46 och be om hjälp.

Språkliga rättigheter = mänskliga rättigheter

Även i år (2017) deltog SEF, tillsammans med ett 70-tal andra organisationer, med en monter vid Mänskliga Rättighetsdagarna, denna gång i Jönköping. Vår mångåriga medlem Thordis Samuelsson hjälpte till att inreda och bemanna montern. Många av dem som kom fram till oss var genuint intresserade av att få veta mer om vad Esperanto är och står för.

En ung man berättade om sitt företag Bonigi, som tagit sitt namn från Esperanto och arbetar med att utveckla och förvalta webbaserade lösningar och tjänster åt organisationer vars målsättning är att skapa nytta och mervärde för individer, samhället och världen. En annan kom från Immanuelskyrkan och ville ha hjälp med några meningar att använda i en föreställning som de spelar på olika språk med deltagare från olika länder.

På fredagskvällen inbjöd vi våra medlemmar i trakten till en kaféträff. Vi blev dock bara en väldigt liten grupp eftersom vi inte har så många medlemmar i Jönköpingstrakten och de flesta var av en eller annan anledning förhindrade att komma. Vi hoppas i alla fall att vi sått några små frön bland besökarna på MR-dagarna.

Ann-Louise



Bonigi AB
Datorgatan 1
561 33 Huskvarna
www.bonigi.se

BONIGI

”Lingva duŝo” kaj lumfesto aŭtune 2017 en Stockholm

En novembro 2017 la klubo de Stockholm aranĝis ”lingvan duŝon”. Tia aranĝo okazis jam kelkfoje dum la pasintaj jaroj. Ĉi-foje la klubo aranĝis unu-horan interparolon per ”skajpo” kun kvar esperantistoj en Japanio. Kelkaj el la japanaj partoprenantoj sidis en manĝejo kun temoj vegetarismo kaj Esperanto, kaj ni povis rigardi kiel aspektas la tabloj kaj vandoj de la manĝejo. Krome estis prelegoj kaj ludoj dum la kunveno.



La klubo ankaŭ aranĝis ”lumfeston” en decembro, kaj en januaro oni faris komunan viziton al pola instituto en Stockholm, kiu ekspoziciis pri Zamenhof pro la cent-jara memorjaro. Fine de januaro Soile Lingman montris bildojn el kunvenoj de la stockholma klubo. La kunvenojn gvidis Tatu Lehtilä, prezidanto de la klubo.

Ulla Luin

Finnlando – 100 jaroj de sendependeco

En restoracio Toveri okazis la 5an de decembro festeto ”etkot” (kiel antaŭfesto de la Tago de Sendependeco) por 45 gastoj diversaj. Inter ili troviĝis sveda esperantistino Kerstin Rohdin, kiu en la fino volis gratuli Finnlandon pro nia 100-jara sendependeco. Ŝi proponis kvaroblan huraon al Finnlando kaj ĉiuj gaje hurais..

Ŝi ankaŭ rakontis, kial ŝi estas esperantistino. Ŝi diris, ke la plej bona maniero konatiĝi kun iu lando estas paroli kun ties popolanoj. En tio Esperanto ja helpas.

Inter la finnlingvaj gastoj troviĝis svedlingvanoj, angla-lingvanoj, hispanlingvano, nur guteto el la lingva riĉo de la mondo. Ŝajnis, ke la aŭskultantoj komprenis la valoron de Esperanto, kaj post la parolado kelkaj venis danki ŝin. Saliko interpretis.

La feston okazigis ŝia ne-esperantista filino Kaisa kune kun amikino. Pluraj el la gastoj venis el studenta kaj kultura cirkloj.

Kuraĝon al ni ĉiuj por reklami Esperanton!

Saliko

Viktigt meddelande från kassören

Har du betalat din årsavgift genom Svea Exchange? Kassören behöver någon uppgift för att kunna registrera den: faktura- eller medlemsnummer och namn. Inbetalningen via banken upplyser inte om betalaren.

Om du fått en faktura på avgiften för att du är direktmedlem eller medlem i Stockholm eller Helsingborg, vars avgifter betalas via Förbundet, så skriv gärna fakturanumret på talongen. Det hjälper kassören att registrera avgiften utan extra knapptryckningar.

Tackar på förhand!

En rubrik som motsäger innehållet?

Under december 2017 hade språkvetaren Mikael Parkvall en daglig kolumn i Svenska Dagbladet, där han granskade språkliga myter och påståenden. En av gångerna var rubriken "Är esperanto inte ett fullt fungerande språk?" (15 dec).

Svaret på frågan från rubriken finns i en lite mindre rubrik i slutet av artikeln: "Slutsats: Det är en myt".

Parkvall är kunnig, och vet tillräckligt om Esperanto för att kunna svara på den egna frågan. Han har vid några tillfällen besökt svenska Esperanto-arrangemang som inbjuden debattör eller föreläsare (på svenska). I artikeln i SvD skriver han korrekt om Esperantos historia och litteratur.

Men för den som inte läser hela texten noga, kan de två rubrikerna tillsammans ge ett

intryck av att Esperanto är en myt. Formuleringarna under slutsatsen är invecklade, och det är svårt att upptäcka att han kanske säger att Esperanto kan uttrycka det man vill ("den som hävdar att språket är inherent oförmöget att uttrycka det som övriga språk kan, måste helt enkelt anses ha fel tills motsatsen har bevisats").

Ulla Luin

Finfina sukceso

Dum tri jaroj mi partoprenis grupon, kiu studis interlingvistikon ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando. En la grupo origine partoprenis 25 personoj diverslandaj kaj la plej multaj el ili ankaŭ sukcese finis la studojn.

Post kelkfojaj malfruoj kaj malfacilaj trovi tempon plenumi la studtaskojn apud mia laboro, mi tamen finfine kun granda ĝojo povis ekzameniĝi en septembro 2017.

Ilona Koutny daŭre gvidas la studprogramon, kiun ŝi komencis en 1997. Ŝi invitas plurajn internaciajn renomajn prelegantojn gvidi la diversajn temojn, ekz Humphrey Tonkin, Istvan Ertl, Ulrich Lins, Aleksander Melnikov, Katalin Kovats.

Temas pri postdiplomaj studoj enhavante temojn pri fonetiko, gramatiko, literaturo, komunikado, lingvistiko ktp. La instrua lingvo kompreneble estas Esperanto.



ADAM MICKIEWICZ
UNIVERSITY
IN POZNAŃ

Kun granda dankemo mi volas danki SEF kiu per siaj fondusoj subtenis min ekonomie pagante la studkotizojn. Sen tiu helpo mi verŝajne ne aliĝus al la studoj.

Pli da informo vi trovas ĉe:
www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/index.html

Bengt Olof Åradsson

Poŝta muzeo akceptis Esperanto-kolekton

La sveda Postmuseum (poŝta muzeo) en Stockholm akceptis transpreni donacon de la kolekto de esperantofilatelaĵoj de Anna-Greta Strönné, kiu vivis 1912-2012.

Grava parto de la kolekto estis ekspoziciita jam en 1987 en la sama poŝta muzeo. Post tiu ekspozicio, ŝi daŭrigis sian

kolektadon ĝis la jaro 2012, kiam ŝi preparis la lastajn foliojn.

En la transdonita materialo estas poŝtmarkoj kun rilato al Esperanto, eldonitaj de diversaj landoj de la terglobo dum preskaŭ cent jaroj, kaj kutime uzablaj en la tuta lando dum longa tempo. Krome estas kolekto de lokaj poŝtaj stampoj el multaj landoj, ankaŭ kun rilato al Esperanto. Stampoj estas pli malfacile kolekteblaj, ĉar ili enhavas daton, kaj kutime estas uzataj dum nur kelkaj tagoj de konferenco aŭ jubileo.

La muzeo planas iom post iom elektronike ŝpari bildojn de la kolekto, kiujn oni povos rigardi surloke en la muzeo per la propraj komputiloj de la muzeo. La kolekto estas transdonita fine de decembro 2017.

Ulla Luin

Ny europeisk data-skyddsförordning

Från den 25 maj gäller en ny förordning om personuppgifter med bättre skydd för individen. Man 'äger' sina personuppgifter i olika register. Uppgifter om medlemmar i SEF lämnas inte till utomstående, bara funktionärer har tillgång till dem i den mån uppdraget kräver det. Och funktionärers kontaktuppgifter lämnas ut i enlighet med deras uppdrag.

Vill du ha en utskrift om vilka data vi har om dig kan du kontakta Anita Dagmarsdotter, 070 329 93 99 eller kasisto@esperantoforbundet.se.

Anita Dagmarsdotter



Fotis Olof Pettersson

POÉSIE EN LIBERTÉ - POEZIO TUT'LIBERA

Internacia konkurso de poezio por gejunuloj

Poezian konkurson, kiu okazas en Francio jam de 20 jaroj, ni sukcesis malfermi al la esperantistaro. Estus grave, ke partoprenus multaj gejunuloj el diversaj landoj por montri kiel viva kaj diversa estas nia movado. La premio, veni senpage al Parizo dum tri tagoj, estas alloga, kaj renkonti aliajn gejunulojn de la tuta mondo estas ĉiam neforgesebla sperto.

Tiu ĉi jaro estos eĉ sendo ĉe la algeria televido pri la fina ceremonio.

Gilles Tabard,

Komitatano de Esperanto-France kaj vic-prezidanto de "Poésie en liberté"

Kontaktoj aŭ demandoj:
gilles.tabard@gmail.com
www.poesie-en-liberte.fr

Poesie en liberté
Maison des Associations
38, boulevard Henri IV
FR-75004 Paris, France



Tiu konkurso, publikigita en la Oficiala Bulteno de la franca Ministerio pri Edukado, estas organizata de la Asocio "Poésie en liberté" (poezio tut'libera) ekde 1998.

Ĝis nun, la poemoj estis nur franclingve. En 2017, partoprenis 4000 gejunuloj el pli ol 20 landoj.

En 2018, por la 20-a eldono, dank' al la ago de Esperanto-France, eblos ankaŭ verki poemojn esperante.

Kiu povas partopreni? Ĉiuj gejunuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jaroj, el ĉiuj landoj.

La partopreno konsistas en sendo de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30

linioj. La kandidatoj rajtas sendi poemon en la franca aŭ en la esperanta, sed eblas sendi poemon en ĉiuj el tiuj lingvoj.

La partopreno okazas nur rete ekde la 1-a de januaro ĝis la 7-a de aprilo 2018 uzante la formularon publikigitan ĉe www.poesie-en-liberte.fr

La ĵurio elektos la gajnantojn fine de majo.

En novembro 2018, tiuj estos invititaj dum 3 tagoj viziti Parizon. La esperantistoj loĝos ĉe esperantaj familioj, kaj partoprenos grandan finan ceremonion. Samtempe, la poemoj estos eldonitaj en libro.

Do ne hezitu sendi vian poemon. Eĉ se vi ne gajnas premion, via partopreno estas grava.

Ni respondos al ĉiuj.

Staĝoj de Greziljono

La sekva programo de kastelo Greziljono:

- 2018-apr-20/28: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj internaciaj KER-ekzamenoj
- 2018-maj-09/13: Korusa renkonto de Interkant' kaj Vegana renkontiĝo
- 2018-maj-09/13: ReVe, Renkontiĝo Vegana
- 2018-jul-09/27: Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj
- 2018-jul-09/16: Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso
- 2018-jul-16/21: Turisma semajno kaj Esperanto-kurso
- 2018-jul-21/27: Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »
- 2018-aŭg-11/19: Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Vidu gresillon.org/agendo

Esperanto-Centro Ora Ponto serĉas volontulojn

Esperanto-Centro Ora Ponto, kiu troviĝas en urbeto Jingchuan de Pingliang urbo, kun 100 mil urbanoj kaj 250 mil kamparanoj, en nordokcidenta Ĉinio. La centro havas du profesiajn esperantistajn laborantojn kaj kvar lokajn esperantistajn kunlaborantojn.

La centro deziras gastigi fremdlandan E-parolanton kiel volontulan helpanton. La ĉefa tasko de la helpanto estas: konversacii kun lokaj komencantoj por paroligi ilin. Se la helpanto konsentus, ni proponus ke li/ŝi fariĝu kunredaktoro de la revuo Tra la mondo por provlegi kaj modifi malneton de la revuo.

La volontulo mem libere decidos la helpan tempon, kaj povos fari proprajn laborojn en la centro. Ni proponas 10 laborajn horojn semajne, se li/ŝi konsentus. En libera tempo lokaj komencantoj povos akompani lin/ŝin por vojaĝi en aŭ ĉirkaŭ la urbeto. La volontuloj povos resti en la centro de kelkaj tagoj ĝis tri monatoj. Pli longa restado estus bonvena, se li/ŝi povus akiri validan vizon.

La centro liveros al la helpanto senpagajn loĝejon, tipan familian manĝaĵon ĉe lokaj esperantistoj, kaj bonan laboran kondiĉon en la centro. Ankaŭ esperantistaj turistoj estas bonvenaj. Al ili ni liveros senpagan loĝadon. Interesantoj kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao, trezoro@qq.com kaj agrikulturo@126.com.

~~~~~

Renato Corsetti, 117 Dukes Avenue, London N10 2QD, UK/Britujo  
tel. +393286315655, +447399273515 [renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)



**L**a 2 decembro 2017 mortis Marianne Westman post mal-sano. Ŝi naskiĝis en 1945, kaj eklernis Esperanton en kurso de la Laborista klubo en Stockholm. Ŝi daŭrigis en la konata somera kursejo en Helsingør komence de la 1970-aj jaroj. Tie ŝi ankaŭ renkontis sian unuan vivkamaradon. Ili aliĝis al la junulara esperanto-grupo "Lingvo-2" en la regiono de Stockholm. Por la junulara kongreso en Fredericia, Danlando 1975, Marianne faris unue bicikloveturon sur la dana insulo Fyn kune kun kelkaj aliaj junaj esperantistoj en Stockholm, kaj poste partoprenis la kongreson. En la preparoj por Universala Kongreso en Stockholm 1980, ŝi estis aktiva preparante liston de lokaj manĝejoj por la kongresanoj. Ŝi ofte partoprenis laboron kun rilato al Esperanto-libroj. Dum multaj jaroj ŝi estis unu el la revizoroj de la Esperanto-klubo de Stockholm.



Profesie ŝi laboris ĉe asekura firmao, kiu okupiĝis pri asekuroj por la labormerkato. Ŝia intereso pri Esperanto bone vidiĝis en ŝia librobreto. Krom tio ŝi interesiĝis pri kuirado, kaj malgranda grupo da esperantistaj amikinoj volonte renkontiĝis ĉe ŝi por kunestado kaj manĝo.

La esperantistoj de Stockholm malĝojas pri la perdo de nia bona amikino Marinne.

*Soile Lingman kaj Ulla Luin*

## Haldo!

**D**ankon por nia interesa, vigla kunlaboro en nia TEDU-regiono (la literoj estas malnovaj simboloj de kvar gubernioj en meza Svedio).

Grupo de laboremaj esperantistoj kolektiĝis semajnfinojn dum pluraj jaroj por lingvaj kursoj, por aŭskulti prelegantojn el diversaj landoj, por diskutoj. Dankon Haldo por tiuj viglaj, feliĉaj jaroj en nia Esperantolando.

Iam mi skribis pri karaj esperantoamikoj, kiuj mortis, ke ili renkontiĝu por daŭran interparolon pri interesaj aferoj sur rando de nubo. Bonvenon inter tiuj esperantogeamikoj por partopreni la gajan kaj interesan interparolon. Tie ni kreas feliĉan, gajan, pacan mondon kune.

Vi restos en mia memoro.

*Kerstin Rohdin*

## Salutojn de Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors



Okazis kurso laŭ la Zagreba metodo kun Arnulf Naif kiel instruisto, la semajnfino 3-4 februaro. Ankaŭ okazis daŭrigo de la jarkunveno.

La kurso daŭrigos paske.

Ne forgesu ke somere, 13-19 julio 2018, okazos la Kultura Esperanto-Festivalo

Sekvu la detalojn en:  
[facebook.com/esperantogarden](https://facebook.com/esperantogarden)

**K**alle Elofsson, en kampo por Esperanto-Gårdens tillkomst och utveckling har nu lämnat vår värld.

Som en av 1990-talets aktiva esperantister trodde han på Esperanto och språkets framtid. Deras tankar och drömmar var att esperantorörelserna skulle förenas i ett projekt för att skapa en kursgård för att visa möjligheterna med språket och dess idé om en bättre värld.

Kalle var en kätte av den gamla stammen som trodde på en rättvisare och bättre värld och ansåg att vi som

människor måste samarbeta för att uppnå ett gemensamt mål.

Under många år var han en person som tog hand om det praktiska göromålen på Esperanto-Gården. Många var de volontärer som under hans handledning skötte om och bättrade på Esperanto-Gården. Arbetet på en förbättring av EsperantoGården pågick stadigt.

När så hans kära hustru behövde mer hjälp och hans egen ork började avta lämnade han ett stort tomrum på Esperanto-Gården. Men tack Kalle för allt stöd som jag fick från dig för att utveckla Esperanto-Gården till något

positivt för Esperanto och dess aktiva medlemmar som en gång i tiden trodde på språket och Esperanto-Gården som en gemensam angelägenhet för att utveckla Esperanto för framtiden.

Jag och Esperanto-Gården saknar dig liksom alla som känt dig som den "agrabla kaj helpema Kalle"

*Lennart, Bengt*  
och alla andra på E-G

Hedra Kalles minne genom Esperanto-Gården – sätt in din gåva på 4440245-1

## Ok personoj en vortara grupo

**N**un ok personoj estas en la grupo, kiu enskribas vortaron en komputilan sistemon. La literoj U, Ŭ kaj V estas videblaj en interreta paĝaro.

La laboro pri la enskribo komenciĝis en 2017, sed la laboro verki manuskripton komenciĝis jam antaŭ dudek jaroj. kiam Roland Lindblom kune kun tiama malgranda grupo eklaboris.

Ulla Luin

**vadi** [intr] vada, pulsa (i vatten, snö)

**vadejo** vadvästelse

**travadi** [tr] vada genom (vatten, snö)

**transvadi** [tr] vada över till andra sidan

**vadmaro** vadehav (strandhav som är torrt vid ebb)

**vadbirdo** (zoo) (*Charadriiformes*) ordningen vadarfåglar

## Förlagsföreningen Esperanto u.p.a. kallar till stämma

Stämman äger rum den 24 mars kl 12.00 på Arbetarrörelsens arkiv, Elektronvägen 2, Flemingsberg.

Styrelsen

## NOVA LIBRO!



**M**alvarma bufedo de Jenny Wrangborg. Tradukis Gunnar Gällmo. Antaŭparolo: Göran Greider. Kovrilo: Mattias Elftorp. 106p. 18 cm. 70 kr.

La bufedistino laboras en kafejo en Gotenburgo. Ĉirkau ŝi svarmas homoj kun siaj sortoj. La malvarma bufedo, ŝia laborejo, iĝas nabo por amikeco, pasioj kaj songoj. Sed ankaŭ por pensoj pri egaleco, kaj la ideo ke ĉio devus esti alia.

"La malvarma bufedo" estas poemaro kaj kolektiva historio, la rakonto pri lukto de laborantaj homoj en kuirejo.

## Eldonejo KAVA-PECH 25-jara

**K**AVA-PECH estas mallongigo en la ĉeĥa kun la signifo **Kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle**. De tio klaras, ke ĝia ĉefa agado ne estis eldonado de libroj. Tamen, post la pensiigo mi ĉesis ĉiujn ceterajn agadojn kaj plu okupiĝas nur pri mia hobbio, eldonado de libroj. Ĉar la unuan libron la eldonejo eldonis en oktobro 1992, ĵus ĝi solenis 25 jarojn de sia ekzisto.

KAVA-PECH apartenas al malgrandaj eldonejoj. Dum 25 jaroj ĝi eldonis nur 197 librojn kun propra ISBN (Internacia Norma Libronumero). Inter ili pli ol triono en Esperanto. Similan nombron da libroj ĝi produktis laŭmende, kio signifas kun ISBN de alia eldonejo aŭ por memeldonistoj sen ISBN, tiujn ofte ankaŭ en Esperanto. Ekzemple por SAT (interalie la du lastaj eldonoj de PIV), FEL, ESE ...; sed ankaŭ en naciaj lingvoj, pluraj ankaŭ en la sveda. Kaj en la fono de eksterlandaj mendantoj estis preskaŭ ĉiam esperantistoj.

En decembro 2016 KAVA-PECH estis enskribita en la Ĉeĥan libron de rekordoj kiel la eldonejo, kiu eksportis propre eldonitajn librojn al plej multe da landoj de la mondo (tiutempe 64), kun la mencio, ke tio okazis precipe per eksporto de la libroj skribitaj en Esperanto.

Jam estis menciite, ke en pasinta oktobro la eldonejo KAVA-PECH festis la kvaronjarcentan jubileon. La festeno okazis en la salonoj de la sidejo de, kaj kunlabore kun la Unio de ĉeĥaj interpretistoj kaj tradukistoj,

kun kiu KAVA-PECH multjare kunlaboras. Ene de la programo estis ankaŭ prezentita la freŝe eldonita *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro* de Miroslav Malovec, enhavanta sur 583 paĝoj proks. 16 000 kapvortojn kaj 40 000 vort-derivaĵojn.

Kiel unikaĵo estis prezentita la ĵus eldonita ampleksa verko (385 paĝa) de poeziaĵoj *La ŝtono de amo* de fama kosova poeto Sali Bashota verkita en la albana, esperantigita de Bardhyl Selimi, unikaĵo duobla, ĉar ne troveblas en katalogoj ĝis nun iu kosova poezio en Esperanto, kaj ankaŭ ne iu eldonita en Ĉeĥio.

En apuda salono estis prezentitaj sur du longaj tabloj ĉiuj libroj de KAVA-PECH momente ofertataj, ankaŭ tiuj en Esperanto. Eblis ilin ne nur trarigardi, sed ankaŭ aĉeti kun grandaj porokazaj rabatoj, kion multaj vizitantoj profitis.

Ne mankis ankaŭ refreŝigo kaj vino por tosti. La festeno trapasis en agrabla etoso. Pavla Dvořáková kun gitaro eĉ kantigis la publikon, kaj ĉar la tekstoj estis projekciataj, oni povis kanti ne nur ĉeĥe, sed ankaŭ en Esperanto. Pro la programo parte en Esperanto, ekspozicio de la Esperanto-libroj, kaj ĉeesto de multaj esperantistoj, la aranĝo havis ankaŭ kroman efikon, per netruda maniero informi neesperantistojn pri Esperanto.

Petro Chrdle,  
chrdle@kava-pech.cz

